

# *Esperantista*

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX, Uralské nám. 9 – Redaktas dr. Stan. Kamarýt

---

**Doksy** – Loka grupo decidis ĉesigi sian ekzistadon la 31-an de decembro 1950.

*Esperantista 1951, p. 21*

## SOMERA KOLEGIO DE ESPERANTO EN DOKSY

(Letní kolej esperanta v Doksech u Máchova jezera)  
28. VII—11. VIII. 1951.

Letní kolej esperanta v Doksech u Máchova jezera uspořádá – pod záštitou Osvětové besedy a za spolupráce Stálého přípravného výboru – ve dnech 28. července až 11. srpna t.r. tyto kursy esperanta: základní (Cseh-methodou), pokračovací, konverzační, řečnicko-tlumočnický, cvičný pro učitele Csehmet. a seminář esperantských výkladů o gramatických problémech esperanta, jeho literatuře a hnutí. - Vyučování vhodně doplní řada společenských podniků, esp. literární soutěž "IV. Květinové hry - Floraj ludoj" a j. Počet účastníků je omezen! - Kolej koná se letos již po šesté. Kvalifikovaní učitelé, 800 dosavadních žáků, přátelské esp. prostředí a okolní přírodní krásy jsou jejím nejlepším doporučením. - Další informace žádejte se známkou na odpověď

**u LKE v Doksech u Máchova jezera č. 453.**

*Esperantista 1951, p. 46*

## SOMERA KOLEGIO DE ESPERANTO EN DOKSY

(Letní kolej esperanta v Doksech u Máchova jezera)  
28. VII—11. VIII. 1951.

O účasti v kursech a semináři, uvedených v první zprávě, bude vydáno žactvu osvědčení. Vyučováno bude denně mimo neděle od 8.—12. hod. ve školní budově. Odpoledne: pobyt na plážích jezera, koupání, společenské besedy, žňová brigáda; večer: umělecká akademie, benátská noc na jezeře, táborový oheň, lampiónový taneční večer a j. Hlavní výlety: odpolední na hrad Bezděz a Kokořín, celodenní autokarový a lodní do Hřenska. — Počet účastníků omezen na 200. Přihlášky přijímají se jen do 10. července.

— Do literární soutěže »IV. Floraj ludoj« přijímají se práce (dosud netištěné a ne starší jednoho roku) do 15. VII. Později došlé i jazykově vadné jsou ze soutěže vyloučeny.

— Kolejné (kursové, ubytování v soukromí s poplatkem z přechodu, ubytování, odvoz zavazadel, permanentní vstupenka k jezeru, osvědčení o účasti, režijní příspěvek) a stravování v restauraci celkem 1.866 Kčs, v závodní kuchyni 1.764 Kčs. Jízdné Hřensko 226 Kčs, Kokořín 80 Kčs, Bezděz 35 Kčs. Přihlášky (se současným zasláním peněz blanco složenkou na šek. úč. 729.501 Okresní spořitelny a záložny v Doksech pro úč. LKED č. 2240 řiďte na L. K. E. v Doksech u Máchova jezera č. 453. — Bližší informace o LKED 1951 najdete v prospektu, jež si vyžádejte.

*Esperantista 1951, p. 64*

## VI. Letní kolej esperanta v Doksech

LKED otevře své kursy a společenské podniky 28. července t. r. informačním večerem, kde dostane se účastníkům informací, pokud jich nenašli v I. a II. zprávě a prospektu, jež zájemci vyžádají si u LKE v Doksech u Máchova jezera č. 453. — Žactvo přijme na nádraží kolejní kancelář, jež obstará odvoz jeho zavazadel. — Účastníci kursů mají 50 % slevu na dráze. — V nádvoří hradu Bezdězu předvedena bude historická scéna podle Čechovy básně »Věž na Bezdězi«. O večeru »Doksy v básni« přednesou autoři 20 svých básní a hudební skladby, inspirované prostředím koleje, jakož i přírodními krásami Máchova jezera a Bezdězu. — Autokarové zájezdy: Bezděz, Kokořín, Hřensko (po Labi z Ústí n. L.). Žactvo má možnost podrobiti se dobrovolným zkouškám, jež konají se na koleji 11. srpna před zkušební komisí Svazu esp. ČSR. — Podmínky IV. literární soutěže »Floraj ludoj« jsou stejné jako loni (viz »Verda Voĉo« č. 2—3/1950). — Počet žactva omezen. Nezapomeňte tedy přihlásiti se včas!

*Esperantista 1951, p. 74*

**Somera Kolegio de Esperanto en Doksy** okazis la 28-an de julio ĝis 11-an de aŭgusto jam la sesan fojon. Aliĝis 151 studantoj, inter ili 26 el Slovakio; kun la instruistoj kaj gastoj ĉeestis sume 165 p. Ili estis instruataj en 6 klasoj: A elementa Cseh-metoda (du paralelaj), B progresanta, C konversacia, D ekzerca por Cseh-metodaj instruistoj, E oratora — tradukista, F seminario por progresintoj. Krome okazis ciklo de tri esperantlingvaj prelegoj po du horoj: Novaj libroj en Esperanto (Rud. Hromada, 8. VIII.). Lego kaj diskuto el la dua ĉapitro de Ŝtato kaj revolucio de Lenin tradukita de V. Demidjuk (Dr Stan. Kamarýt, 9. VIII.) kaj Esperanto-lingvo vivanta (Karolo Píĉ, 10. VIII.). Instruado okazis en klasejoj de la meza lernejo sur la placo je la 8—12 horo, ekzercoj kaj instrukcioj estis donataj ĉe la lago aŭ en klasejoj posttagmeze je la 14-a aŭ je la 17-a. Ankaŭ ekskurso al fiŝlago Břehyně la 10-an de aŭg. estis uzita por prelegoj de oratora kurso kaj pri vivo de Zamenhof. Direktoro de la kolegio estis Dr Aug. Pitlík kaj krom li instruis Josef Friedrich, Rudolf Hromada, Dr Stan. Kamarýt, Prof. Josef Kožený, Ant. Slanina, Magda Seppová, Karel Šolc, Václav Špŭr, Josef Vítek. La ekonomian administradon estris V. Špŭr, la distran fakon Ant. Slanina, la vendejon Fr. Pytloun.

Ĉiutage aperadis po 4 paĝoj ciklostilita informa, instrua kaj amuza bulteno de SKE de Doksy *V e r d a V o ĉ o* redaktata de Ant. Slanina helpata de J. Vítek, M. Seppová, J. Kožený. Tiu ĉi tagĵurnalo, unikaĵo inter esp. gazetaro, estis legata de ĉiuj kolegiانو kun granda fervoro, ĉar ĝi ĉiam estis aktuala kaj ofte enhavis bonajn spritaĵojn.

Interkonatiĝa vespero okazis la 28-an de julio je la 21-a horo en salono ĉe Jelen prezidata de V. Špŭr. Venis al ĝi reprezentanto de Loka Nacia Komitato ĝia vicprezidanto, kiu reprezentis ankaŭ Klerigan Kunularon (Osvětová beseda) s-ro Slavík kaj du reprezentantoj de distrikta komitato de la Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio (KPCĤ) s-roj Josef Banas kaj Pavel Mičík. Ĉiuj tri alparolis la kunvenon. La unua citis el Lenin principon ĉiam apliki vidmanieron de la interklasa batalo, la dua insistis pri devo neniam laciĝi en vikleco kaj uzi por ĝi ankaŭ Esperanton, la tria s-ro P. Mičík, sekretario de Kultprop diris:

„En nomo de distrikta Komitato de Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio en Doksy mi deziras al via kursaro multan sukceson kaj mi kredas, ke vi plene uzos tiun ĉi okazon, por ke vi pliprofundigu viajn sciojn por pli sukcesa kaj pli rapida marŝo de nia popoldemokratia respubliko sub protekto de USSR al masonado de nova socia ordo.“

„Via kursaro, via lernado estu gvidata kaj inspirata per ideo de batalo por konstanta mondopaco. Kondukate de nia glora Partio KPCĤ kaj gvidate de nia amata prezidento kamarado Kl. Gottwald ni sukcese plenumas taskojn de la kvinjara plano. Laboristoj en fabrikoj transpaŝas, laŭ maniero de socialita konkursado, la normojn, ĉar ili konscias, ke ili estas mastroj en propra entrepreno kaj ke iliaj laborrezultoj respuguliĝas en plialtigo de vivnivelo de nia laboranta popolo. Miloj da terkulturistoj etaj kaj mezaj komprenas, ke ili ne povas halti en historia evoluo de nia lando kaj ili kolektive mastrumas sur bazo de spertoj el Sovetio sur kunigitaj kampegoj helpe de plej modernaj maŝinoj, kiujn liveris al ni Sovetio. Per helpo de la laborista klaso ni kreis novan, pli

bonan, vivon de niaj etaj kaj mezaj kampistoj. Ni kreas novan vilaĝon. Jam 7 877 Unuecaj Terkulturistaj Kooperativoj montras, kia transformiĝo en nia vilaĝo okazis."

„Spertoj instruas, ke la klasmalamiko kaj la burĝaro ne rezignos pri sia potencoperdo. Ili klopodas per ĉiuj rimedoj, subtenate de imperialistoj, bremsi nian evoluon al socialismo. Ili klopodas timigi nin per krimbruligoj, embuskado, murdoj. Imperialistoj klopodas estigi novan militbrulegon." -- -- --

„Despli elstaras aranĝo de tiu ĉi kursaro, kies celo estas plifirmigi kaj pliprofundigi reciprokan kompreniĝon inter ĉiuj progresemaj civitanoj de ĉiuj landoj. Esperanto signifas por vi ŝlosilon por sukcesoj de nia lando kaj de nia laborista klaso, rezultojn, kiujn akiris niaj nacioj sub protekto de USSR kaj de amata Stalin. Helpe de Esperanto vi povas kaj devas informi ĉiujn en la tuta mondo, kiamaniere ĉe ni regas kaj vivas laborista klaso sen kapitalistoj, bankistoj, uzinposedantoj."

„Vi ĉiuj havas la povon kaj la devon montri, kiamaniere povas kaj devas laboristaj klasoj de ceteraj subpremataj nacioj unuigitaj en Atlantika Pakto kaj en Pacifika Pakto forĵeti sklavkatenojn kaj iĝi liberaj homoj, kiel en USSR, ĉe ni, kaj en ceteraj popoldemokratiaj landoj."

„Multaj el vi korespondas kun laboristoj kaj kolĥozanoj en USSR. Uzu la eblecojn kaj transportu spertojn ricevatajn en niajn entreprenojn kaj niajn vilaĝojn, organizu kunestojn kaj prelegojn kun sturmuloj kaj anoj de Unuecaj Terkulturistaj Kooperativoj." -- -- --

„Vian scion de Esperanto uzu por daŭre pli intensa batata por la paco. Informu ĉiun pri niaj sukcesoj. Sed neniam forgesu la viglecon kaj singardemon. Ne forgesu, ke en la internacian organizaĵon de Esperanto ŝtelŝovis sin multaj malamikoj de la progreso kaj paco. Ne ĉiu ano de tiu organizo, precipe inter tiuj starantaj sub influo de imperialistoj, pensas siajn deklarojn pri la paco sincere. Tial neniam forgesu devon malkaŝi perfidon kaj tiujn individuojn, kiuj volus damaĝi al USSR, al niaj nacioj kaj al popoldemokratioj."

„Tial mi ankoraŭ foje deziras al via lernigado multan prosperon kaj mi vokas vin ĉiujn al batalo por la paco sub gvido de granda Stalin. Honor' al labor'!"

Ĉiuj tiuj diskursoj estis akceptitaj kun brua aplaŭdo.

Direktoro de la Kolegio dr. Pitlík skizis ĝisnunajn rezultojn de kolegiaj laboroj kaj prezentis ĉiujn instruistojn. Ili diris siajn salutojn al la lernantoj. V. Špŭr donis detalajn klarigojn pri administraj aferoj.

La 19-an de aŭgusto je la 12-a horo okazis ĉeflingva prelego de asocia prez. Adolf Malík: Pri problemaro de nova Ĉinio. Aŭskultis ĝin ĉiuj kolegianoj tre atente.

Sabaton la 11. VIII. estis la kolegia laboro finita per skriba ekzameno, post ĝi sekvis adiaŭa kunveno de ĉiuj kolegianoj, en kiu la instruistoj adiaŭis siajn lernantojn kaj ĉiuj kun kontento aŭdis konfirmon, ke Kolegio okazos ankaŭ en venonta jaro.

La posttagmezaj kaj vesperaj programoj denove kreis la Doksan atmosferon de amikeco kaj samideaneco.

Improvizitaj programoj okazis lundon la 30. VII. je la 16-a kaj la 3. VIII. je la 20,30 h. La reĝisoro de programoj Ant. Slanina ĉiam sukcesis aperigi sur scenejo kolegianojn rikoltontajn bruajn aplaŭdojn: E. Suchardová, Kožený, Hanako, Rokycana, Vitek, Kissová, Šedin kaj aliajn. Ĵaŭdon la 2. VIII. vespere oni veturis per motorboato al Staré Splavy kaj post duonhora kunesto en surborda restoracio oni marŝis piede al Doksy kantante. La promeno estis tre agrabla por ĉiuj.

Tradicia ekskurso al kastelo Bezděz okazis la 1-an de aŭgusto posttagmeze; post vizito de la kastelo ĉiuj revenis al gastejo sub la kastelo, kie la programo daŭrigis per vespermanĝo, dancado kaj reveno en aŭtobusoj noktomeze. Ankaŭ aŭtobusa ekskurso al Kokořín la 9. VII. posttagmeze kontentigis ĉiujn partoprenintojn.

Dimanĉa ekskurso en tri aŭtobusoj estis impona. Oni forveturis la 5-an de aŭgusto je la 5,15 horo matena. Antaŭis la forveturon je la 4,30 sankta meso en la preĝejo kun kantoj kaj preĝoj esperantlingvaj. La aŭtobusoj veturis al Ústí n. Lab., kie ni transiris al ŝipo veturiganta nin sur Elbo tra la pitoreska valo ĝis Hřensko. La panoramoj estas ravigaj. Krome muzikis sur la ŝipo orkestro kaj oni povis danci. En Hřensko estis tagmanĝo en hotelo Bílý Lev, poste sekvis aŭtobusa veturado al piedo de Pravčická Brána, kiun ĉiuj suprengrimpis kaj reveninte veturis aŭtobuse al valo de

rivereto Kamenice, laŭiris ĝin piede kaj estis transportitaj per boatoj tra la Ĵuriŝ-interkrutejo. Post preskaŭ duhora marŝo ĉiuj atingis la aŭtobusojn ĉe la haveno en Hřensko. Ili revenis al Doksy je la 20-a horo. La aranĝo de la ekskurso estis tre agrabla; ni danku gvidinton s-on Vítěk, kiu zorgis pri plenumo de la programoj kaj atingo de fiksitaj horaroj kaj de s-o Pytloun, kiu veturigis provizojn de jahurtoj kaj de aliaj manĝeblaĵoj.

Unu malagrabla akcidento okazis. S-ino Vlasta Hošková el Plzeň B-kursanino, dum malsuprenirado sur la herbejo al la Kamenice-valo glitis kaj rompiĝis ŝiaj ambaŭ tibioj kaj ŝiriĝis unu tendeno. Ĉeestantaj Dro Izák kaj fratulino el Ruĝa Kruco en Brno Borská provizore bandaĝis la kruron kaj transportigis ŝin al malsanulejo en Děčín. Estos bezone, ke s-ino Hošková kuŝu tie ĉirkaŭ ses semajnojn. Vizitis ŝin en la malsanulejo la 8. VIII. ses gekursanoj. Ŝi akceptis la akcidenton kun sportista kuraĝo. Ŝi ne plendas, ŝi estas nur scivola, ĉu ŝi kapablos skiadi same bone kiel antaŭ la akcidento. Samideanino Hošková akceptu niajn salutojn ankaŭ pro tiu ĉi ŝin honoriga sinteno en situacio nefavora.

La tradicia Venecia nokto sur la Mácha-lago la 8.VIII. kunvenigis ĉiujn kursanojn kaj multajn gastojn. La unua kanonpafo anoncis komencon de boatpromenado, la dua bruligon de torĉoj kaj de lampioj, koncerton de muziko sur la ĉefa ŝipo, kanton de operkantistino Věra Borská, artfajraĵojn pireteknikistajn. La tria kanonpafo signifis revenon en la strandan restoracion, kie oni dancis ĝis noktomezo.

Vespero de sorĉoj de samideano Rýznar la 4-an de aŭg. en stranda restoracio kontentigis ĉiujn same pro la prezentitaj artifaĵoj kiel pro la ĉarmeco de la prezentmaniero. Esperantista amatora sorĉisto devis sorĉi en kondiĉoj pli ol primitivaj. Tamen la rezulto ne diferencis de tiu sur luksaj scenejoj.

Matĉo inter ŝakista deko de SEKD kontraŭ ŝakistoj de la ŝakista grupo de Doksaj Komunalaj Entreprenejoj finiĝis per venko de ŝakistoj esperantistaj 5½ kontraŭ 4½ (7. VIII.).

Maska balo la 10. VIII. estis gaja fino de amuzadoj.

Vespero „Doksy en poemoj kaj kanto« reĝisorata de Dro Pitlík la 31-an de julio prezentis 21 poemojn de 9 aŭtoroj, kiuj estis inspiritaj de Doksy-regiono aŭ de vivo en la kolegio. Al tri el tiuj ĉi estis komponita muziko. La aŭtoroj estas Dr Pitlík, K. Píĉ, E. Urbanová, L. Rejthárková k. a. Krom tiuj verkoj estis deklamitaj versoj de Fráňa Šrámek, Vítězslav Nezval, K. M. Wallo, Ronsard. Deklamis krom dr. Pitlík, kiu legis proprajn versaĵojn, Suchardová, Rejthárková, Kožený.

Koncerto de profesoro Hršel la 6. VIII. prezentis koncerte luditajn specimenojn de violona klasika muziko. Alternis deklamoj de E. Suchardová. Piane akompanis H.Kulová, kiu krome kantis du kantojn de Smetana.

Solena koncerto la 9-an de aŭgusto en salono ĉe Jelen estis grava artista evento. Prezentis sin kantista ĥoro de B-kursanoj gvidata de s-ino M. Seppová, estis deklamitaj de prof. Kožený kaj de Eva Suchardová en ĉeĥa originalo aŭ en esperantlingva traduko poemoj de Šrámek, Nezval, Tagore, Puŝkin (la letero de Tatiana en rusa originalo deklamita de Věra Kožená, en Kalocsay-traduko de E. Suchardová), prof. Hršel violonludis, operkantistino Věra Borská kantis klasikajn ariojn, inter ili la ĉiam ekscitan Carmen-kanton, Květa Kožená pianoludis, samidenino Kissová kantis kantojn slovakajn sekvatajn de granda aplaŭdo. Nepran laŭdon meritas ankaŭ s-o Ph. Mr. Ondřej Hoffman el Lipt. Sv. Mikuláš pro sia oferema kaj sperta pianoakompano.

En la fino de la koncerto prezentis direktoro Dr Pitlík rezulton de la IV-aj Floraj Ludoj. Premiojn ricevis 1. Pro originalaj poemoj: Niko Ĉekal (Sub verdan stelon!), Eli Doubravská-Urbanová (Nimfoj kaj Fatala amatino). M. Kleinhauerová (Kial). Jiří Kořínek (Disko invitas), K. Píĉ (Ridindaj tumultoj, Kursa legolibro, Epitafo), L. Rejthárková (Ni ree doksas), E. Suchardová (Letero al malproksimo). 2. Pro traduko de ĉeĥa poemo: Jiří Kořínek (Poŝa tuko de V. Nezval). 3. Pro originala esp. prozaĵo: Aug. Ĉambál (Revoj de l'infano), 4. Pro muziko al originala esp. poemo: Št. Urban (La vojo de Zamenhof).

Manifestacia pacokonzerto de klasika muziko en la dekana preĝejo la 7-an de aŭgusto vespere estis la plej altnivela el artismaj entreprenoj de la Kolegio. Aktive partoprenis operkantistino Věra Borská (Brno), arĉa kvarteto de la I-a violonisto Miroslav Tyrála (Ostrava), II-a violonisto Ladislav Kafka (Bakov), aldoviolonisto JUDr. Josef Fousek (Přelouč), violonĉelisto

MUDr Frant. Vaněk (Karlovy Vary), Kantista ĥoro de SKED kondukata de JUDr J. Fousek. La programo estis iena: 1. Seb. Bach: Ario. 2. Dvořák: Bibliaj kantoj. Brahms: Lulkanto. Händel: Largo. 3. Bériot: Adaĝo. 4. Mozart: Ave Verum (en esp. traduko de Dr Fousek). 5. Schubert: Kvarteto Es-dur. 6. Gounod: Ave Maria. Caro mia ben. 7. Ĉajkovskij: Andante Cantabile. Dvořák: Bonan nokton, opus 16. La multnombra ĉeestantaro silente kaj profunde kortuŝita aŭkultadis pie la muzikon kaj kantojn el la ĥorejo. Sub potenca influo disiradis la publiko sub la ĉielon en varma vespero.

**Ekzamena komisiono kunsidis en Doksy** la 11-an de aŭgusto. La senato konsistis el Dr Stan. Kamarýt prezidanta, Rudolf Hromada, prof. Josef Kožený, Dr Aug. Pitlík. Prezintis sin al la ekzameno unuagrada 8 kandidatoj, al la duagrada du. La rezulto estas jena:

Diplomon pri lingva scio ricevis Zdeňka Dobiášová el Brno, JUDr Bohuslav Jakerle el Liberec, Anna Knollová el Brno, Miloš Slabihoud el Vejprty, František Strumínský el Ostrava, Jaroslav Suchánek el Chvalkovice, Karel Šmucha el Ostrava, Anna Veselá el Rokycany.

Diplomon pri kapableco instrui Esperanton en lernejoj kaj kursoj ricevis:

Augustin Ĉambál, faka instruisto en metia lernejo en Martin. Kiel hejman taskon li ellaboris: "Edukado de metilernantoj en kapitalismo kaj en socialismo."

MUDr Ludovít Izák, kuracisto specialisto en Martin. Kiel hejman taskon la senato akceptis liajn artikolojn „Kio okazas en Ĉeĥoslovakio“ aperintajn en „Esperantisto Slovaka“.

Ĉe la unuagradaj ekzamenoj estis donitaj notoj 4 bonege, 2 tre bone, 2 bone. Ĉe la duagradaj 1 eminente, 1 tre bone kapabla.

La ekzamenitoj akceptu krom la gratulo pri sukceso sinceran dankon pro ilia sindediĉo al lingvaj studoj.

*Esperantista 1951, p. 98-100*

**Doksanoj, fotografintoj, atentu!** Por la Esperanto-muzeo en Kopřivnice ni bezonus ĉiujn fotografajojn faritajn dum la Somera kolegio de Esperanto, Doksy. Bonvolu afable sendi ĉiujn specojn al Rudolf Zanáška, Kopřivnice, Jiráskova 442 kaj sciigi la prezon. Dankon kaj koran samideanan saluton.

*Esperantista 1951, p. 112*

# Verda Voĉo de Doksy

informa, instrua kaj amuza bulteno de SKE de D o k s y

---

1. zvláštní vydání  
"Zpívejte s námi!"

## **L a E s p e r o** (Himno esperantista)

En la mondon venis nova sento,  
tra la mondo iras forta voko,  
perflugiloj de facila vento  
nun de loko flugu ĝi al loko.  
Ne al glavo sangon soifanta  
ĝi la homan tiras familion.  
Al la mond' eterne militanta  
ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero  
kolektiĝas pacaj batalantoj,  
kaj rapide kreskas la afero  
per laboro de la Esperantoj.  
Forte staras muroj de mil jaroj,  
inter la popoloj dividitaj,  
sed dissaltos la obstinaj baroj  
per la sankta amo disbatitaj.

Sur la neŭtrala lingva fundamento,  
komprenante unu la alian,  
la popoloj faros en konsento  
unu grandan rondon familian.  
Nia diligenta kolegaro  
en laboro paca ne laciĝos,  
ĝis la bela songo de l' homaro  
por eterna ben' efektivigiĝos.

## **TAGIĜO!** (A. Grabowski - Muziko A. Baranski)

Akordu la brustojn, ho nia fratar'  
per nova, pli vigla jam kanto,  
ĝi sonu potence de montoj al mar',  
anoncu al ĉiu dormanto:  
Tagiĝo, tagiĝo, radias en rond',  
la ombroj de l' nokto forkuras el mond'

Ni velas antaŭen kun kredo en kor'  
benante la Majstron por verko,  
kaj lian anaron de plej frua hor',  
fidelan al ĝi ĝis la ĉerko.  
La mond' aliiĝos, la temp' pasos for,  
sed vivos eterne pri ili memor'.

Post longa migrado sur dorna la voj'  
minacis nin ondoj de l' maro,  
sed venkis ni ilin kaj velas kun ĝoj'  
al verda haven' de l' homaro,  
post longa batalo, maldolĉa turment'  
la stela standardo jam flirtas en vent'.

En ĉiu mondparto, en ĉiu ter-zon',  
en koroj de centoj da miloj,  
jam vibras por nia saluto reson',  
Do kantas de l' tero ni filoj:  
Tagiĝo, tagiĝo, radias en mond',  
la ombroj de nokto forkuras el mond'.

### **Kanto de l' laboro. (Píseň práce)**

Eksonu kant' pri l' nobla fort'  
ligita jam al homa sort'  
dum li sen homa mor'  
kaj ĉio, kion havas li,  
kreiĝis el la lig' kun ĝi  
/:Glor' al labor':/

Kaj kiam tra l' arbusta bar',  
kaj tra l' timinda praarbar'  
li rampis kun angor',  
armilon donis por defend'  
labor' al duonbesta gent'  
/:Glor' al labor':/

Por gajni panon per semad'  
li finis vivon de l' nomad'  
pafarkon ĵetis for,  
plugilon kreis en konkord'  
la per labor' - ĉi-krea fort'  
/:Glor/al labor':/

### **Národní písně v esperantskám překladu.**

(Uschovejte je pro jízdu na lodi!)

#### **Al la rivereto (Holka modrooká).**

Al la rivereto, bluokula knabineto, al la rivereto ne iradu plu!  
Raba akvo vin forportus kaj domaĝe, se vi mortus, al la rivereto ne iradu plu!

#### **Maja kanteto.**

Revenu, ĉarma majo, kaj igu paradiz'!  
La kampojn kaj arbarojn, per via dolĉa kis'!  
Kiseto via igas subite bela flor',  
vi montras la naturon en ĝia tuta glori'.

### **Bela flor'. (Boleraz, boleraz. . .)**

Bela flor', bela flor', ho, bela verda flor'!  
Restu, fraŭlo, ĉe ni, kaj ne iru plu for!  
Mi ĉi tie restus, kara kolombino, se vi min vekigus, antaŭ la mateno.  
Ŝi ne vekigas min, kvankam sun' lumas jam,  
ŝi ja faras tion pro fidelo de l' am'.

### **Mi aĉetos ĉevaletojn (Na konička ....)**

Mi aĉetos ĉevaletojn ironte al milito,  
kaj forgesos, amatino, vin mia ho, spirito!  
Ĉevaleton mi sursaltos, ekbrilos la sabreto',  
kaj la koro dissaltiĝos, al la karulineto.  
Am' kaŝata min doloras, turmentas min sen fino!  
Vi ne scias, ke mi estas aĥ, via amatino!

### **Sur herbejo ..(Na tý louce zelený . . .)**

Sur herbejo vidis mi, ke sin paŝtis cervoj tri,  
paŝtis ilin arbaristo, verdan veston havis li, havis li.  
Ho, atendu amatin', por ke mi ĝojigu vin,  
mi mortpafos unu cervon, kaj al vi mi donos ĝin, donos ĝin.

### **Junulin', belulin'... (Pod dubem, za dubem ...)**

Junulin', belulin', havis pomojn tri,  
unu nur por plezur' donis ŝi al mi.  
Ne pernesis la knabin', ke mi plue petu ŝin,  
Ho, sinjor', iru for, mi ne donos pli!  
Semis mi tritikon, ĝi ne vidos min,  
volis mi bieron, mi ne trinkos ĝin.  
Amis min la junulin', alia forlogis ŝin,  
tiel jam nia am', estas nun en fin'.

### **Akra la sabreto (Šablenka brúšená . . .)**

Akra la sabreto, mia edzineto, ĝi min defendsavos tuj al min peto.  
Hujaja, hujaja, hujaja, hujeja, ĝi min defendsavos tuj al mia peto.  
Ne sur pajlo mortos mi, sed en batalo kaj sabret' eksonos tuj dost  
Hujeja, ..kaj sabret eksonos tuj post mia falo.



# Verda Voĉo de Doksy

informa, instrua kaj amuza bulteno de SKE de D o k s y

Nro 1.

30.7.1951.

## Je **důležité** vytknout si **cíl!**

Bez cíle není možné soustředění, bez soustředění se nedostaví úspěch. Přihlásili jste se do letní koleje Esperanta v Doksech. Váš cíl je jasný- naučit se Esperantu. Naučit se nu nejen po stránce teoretické, ale i praktické. SKED má kurzy pro začátečníky, pro pokročilé i pro ty, kdo se připravují ke zkouškám; má také kurs řečnický a instruktorský pro vyučující přímou metodou.

Chce-li někdo opravdově, není téměř nic, čeho by nemohl dosíci. Nebojte se, že úkol je příliš veliký. Kdo chce dokázat velké věci, musí si dát velké úkoly. Důležité je, abyste věřili ve zdar svého úmyslu, neboť tak posílíte a zvýšíte svou vytrvalost, která je nezbytná k dosažení cíle. Cesta k tomuto cíli bude rozdělena na úseky. Soustřeďte svou sílu na nejbližší úsek, t. j. na svůj denní úkol ve škole. Tím, že se učíte, posilujete svého ducha. Říká se "ve zdravém těle zdravý duch", ale zapomíná se, že je to silný duch, který formuje zdravé tělo.

Esperanto má vznešený cíl: mír mezi národy! A tomuto cíli jistě rádi věnujete své síly.

A. Slanina.

L. Rejthárková: **Ni ree "DOKSAS".**

Sesan jaron jam en Doksy  
brilas stel' de Esperant',  
ĉie flirtas verdaj flagoj,  
ĉie sonas nia kant'.

Niaj bonaj samstelanoj,  
venu ĉiuj inter ni,  
eĉ se vi jam konas multe  
vi ekscios certe pli.

Se vi estas komencantoj,  
ĝoju pri la estontec',  
venu en ĉi urbon ĉarman,  
lokon plenan de belec'.

Katon, hundon vi ekkonos  
tuj en la unua hor'  
kaj post kelkaj lecionoj  
estos verda via kor'.

Mi ĉi tion tute bone  
de kvin jaroj konas jam,  
ke al Doksy ĉiujare  
verdstelana kreskas am'.

Kiu "doksis" dum kursaro  
en la kvardeksesa jar',  
li volonte revenadas  
al Doksy kaj ĉeĥa mar'.

Kaj nun, karaj "gedoksanoj",  
sekvas mia lasta vort',  
ke "doksadi" al vi plaĉu,  
ke vi "doksu" ĝis la mort'.

## ZAHÁJILI JSME VI. BĚH LETNÍ KOLEJE ESPERANTA V DOKSECH.

Účastníci VI. běhu LKED se sešli 28. 7. 1951 o 21. hodině v sále restaurace u Jelena, kde byli přivítáni s-anen V. Špůrem. Týž uvedl zároveň zástupce MNV a MOB s. Slavíka a zástupce OV KSČ s. Banase a tajemníka kultpropu s. Mičíka. Tito zástupci lidové správy a KSČ promluvili o důležitosti Esperanta v boji za světový mír a ocenili a zhodnotili úspěšnou činnost čs. esperantistů, kteří se zařadili do budovatelského úsilí našeho pracujícího lidu, aby působili doma i za hranicemi na veřejné mínění a seznamovali zvláště pracující v kapitalistických zemích s prací, úspěchy i způsobem života našich dělníků a úderníků. Vybídli přítomné esperantisty k ještě větší činnosti a vyslovili přání, aby Esperanto ještě více proniklo do řad pracujících a členů ČSM.

PhDr Aug. Pitlík dotkl se několika slovy vlastního účelu a poslání kursů a představil přítomným všechny vyučující. S. dr. Kamarýt promluvil o úspěšných výsledcích esperantistů v organisovaném aktivním zápase o světový mír a zmínil se též o úspěších esperantského vysílání v rozhlase, jež mělo v zahraničí největší ohlas mezi všemi cizojazyčnými vysíláními.

Pak pronesli i všichni členové učitelského sboru své zdravice. Večer byl zakončen pokyny a informacemi účastníkům LKED.

## BELETRIO

Št. Urban: **Nokta ekspreso**

(Premiita okaze de la III. Floraj ludoj en Doksy, 1949.)

Kraketante monotone tranĉis la orienta rapidvagonaro la densan nokton. Observado al fajraj strekoj, rapide pasantaj malantaŭ la fenestro, jam lacigis min kaj preninte gazeton mi provis denove legi. Sed la malgranda plafonlampeto ne lumis sufiĉe klare kaj mi baldaŭ rezignis la legadon. Kia enuo, la nokta vojaĝo, kia enuo . . . Kial mi ne preferis uzi la matenan vagonaron? Almenaŭ mi povus observi la pejzaĝon kiel rulantan filmon... Kia senfina enuo!

Mia sola kunvojaĝanto kaŝita en sia mantelo, dormas senĉese en la angulo de la kupeo.. . Se mi almenaŭ por momento povus vidi, kiel la pasaĝero aspektas! Mi iomete divenus lian karakteron por aŭguri liajn interesojn. Eble ankaŭ mi povus komenci iam interparolon, egale ĉu pri politiko, scienco aŭ arto, tute egale, nur se li ne tiom obstine dormus. Kia senfina enuo. . . Kaj mi laŭte kunpremis la gazeton...

Nun la pasaĝero vekigis kaj rigardis la horloĝon oscedante. Mi revivigis vidinte lian interesan vizaĝon kun nigraj profunde enfalantaj okuloj kaj alta inteligenta frunto... Post momento li elpoŝigis anglan pipon, plenigis ĝin kaj bruligis. Ĝis nun li apenaŭ rimarkis min. La odoraj nubetoj ŝvebis en nia komuna kupeo kaj la tempo malrapide pasis. Kvankam ni ambaŭ silentis, tamen mi jam ne sentis tiel malagrabla mankon de amuzo. Mi trovis „cigaredojn en mia poŝo kaj decidigis daŭrigi la silentadon. Sed mia bruligilo spitis obstine kaj daŭre kaj la atendata flameto ne montriĝis, malgraŭ ripetitaj provoj.

Tiam mia kunvojaĝanto la unuan fojon rigardis min – iomete riproĉe - kaj proponis al mi siajn alumetojn. La cigaredo ekbrulis...

"Mi preferas pipon", diris mia kunulo kun fremda akcento, ridetante enigme. Antaŭ milito mi ankaŭ fumadis cigaredojn, sed nun mi ne plu alkutimiĝus.. . Mia kompatinda herbario. . nun mi fumas nur anglan pipon", kaj li eksilentis strange.

(daŭrigo sur paĝo 4)

## NOVAĴOJ.

Hodiaŭ estas lundo, la 30an de julio, festo de Bořivoj.

Ustálené počasí, dopoledne chladno, odpoledne vysoké teploty následkem prvních lekcí ve škole, jež zchladí mírný deštík.

Dnešní zábavný program:

Odpoledne besídka ve škole, večer pilné studium.

### Zatímni program na tento týden:

Úterý: Večer "Doksy ve verších".

Středa: Odpolední výlet na Bezděz.

Čtvrtek: Večer volno.

Pátek: Táborový oheň nad Čepelákem.

Sobota: Večer divů a kouzel.

Neděle: Celodenní výlet do Hřenska.

## SENTENCOJ.

Uvaruj se zbytečných gest a nesmyslných činů! - Je nutno věděti, že myšlenky vznikají z řetězu příčin. - Uvaruj se činů, jež škodí tvému duchu a brzdí tvůj duševní vývin.

## PROVERBOJ.

Ĉirkaŭ sanktuloj diabloj vagas. - Ne ekzistas fumo sen fajro. - Kie ĵuron vi aŭdas, malbonon suspekto. - Kie sklav' regadon havas, tie mastro baldaŭ sklavas. - Kie timo, tie honto.

## KLAĈEMA OBSERVANTO

Při sobotní informační schůzi nabízel s-án Pytloun koupi jogurtů na památku. Rádi bychom věděli, jak dlouho takový jogurt jako památka vydrží a zda je nutno jej dát do rámečku.

S-án Friedrich učinil nový objev, že se dá na motorce také létat "sem a tam po ulici". Prosíme o sdělení, jak vysoko je možno s takovou motorkou vzlétnout, zda má vrtulí a kde?

"Rokycana"

Počtářský pokus s-ána Špůra uvedl nás u vytržení. Počítejte s námi: podle jeho oficiálního sdělení je na den určeno 15 dkg masa a to 10 dkg v poledne a 5dkg večer. On však počítá takto: aby byly porce větší, bude v poledne maso 0 (žádné), k večeri 5dkg. Druhý den obráceně: v poledne masa 5dkg a večer masa 0 (žádné). Sečteno dohromady na dva dny: 10 dkg masa. Ptáme se, kdo sní zbývající 20dkg? - Nebylo by možno, abychom mohli sečíst 0 v poledne a nulu večer? ( $0 + 0 = ?$ )

Sa

Učitelé Ĉe-methody hledali živý inventář pro demonstrování v kursech. Zašli do cirkusu Ctirad, který právě hostuje v Doksech a požádali o zapůjčení zvířátek. Byl jim velkomyslně nabídnut slon. Tuto nabídku museli však odmítnout, neboť při konfrontaci zjistili, že by toto "zvířátko" neprošlo dveřmi třídy.

## ĈU VI SCIAS?

Kiom da konsonantoj estas en alfabeto de Esperanto? - Kio estis spesmilo? Kia estas la diferenco inter "ankoraŭ" kaj "jam". Kiu estas la kvina tafo de la semajno? Ĉu tiu ĉi frazo estas bona: "La bona edzo amas lian edzinon". Nomu la solidan formon de akvo! Kion signifas la vorto "groto"?

Kiu estas la plej pia ŝtono? Ĉu blinduloj povas legi Esperanton?

"Kion vi diris? Ĉu la herbario? . . ."

"Mi diris ion pri herboj? Pardonu, mi ne scias...," li respondis hezite kvazaŭ mirigita. Sed mi tuj rimarkis bone kaŝatan inciton en lia voĉo.

"Jes, vi diris "Mia kopipatinda herbario...!"

"Nu, ne gravas, pardonu, estas longa historio kaj mi supozas, ke vi ne interesiĝas... ĝi ja estas nepre mia persona afero.. . mi opinias."

Sed mia intereso estis jam vekita kaj spite mi volis ekscii, pro kio li estis incitita, kiel mi sendube vidis. Mi impetis lin, ke li rakontu la tutan okazintaĵon kaj mi instigis lin ĉiam denove al sciigemo evidente ne tro granda. Kelkajn minutojn li ankoraŭ silentis meditante pri io. Subite li decide ekbruligis sian estingiĝintan pipon kaj rigardante ĝin, li komencis rakonti:

"Mi ĉiam intencis fariĝi natursploristo. Kiel infano mi evitis la societon kaj la ordinarajn ludilojn kaj ludojn kun aliaj infanoj min ne ŝatis... Kun plej granda ĝojo kaj intereso mi foliumis en libroj pri naturscienco, kolektis skarabojn, florojn kaj ĉion eblan.. . Precipe mia kolekto de la arbfolioj estis enviinda. Nia familio vagadis tra la plej diversaj ŝtatoj kaj lokoj, kie mia patro - arkitekturisto - konstruis pontojn kaj elektrajn centralojn kaj mi ĉien trenis mian ŝatatan kolekton, ne ĉesante ĝin pliriĉigadi ĉe ĉiu okazo. Post jaroj, kiam mi devis disiĝi de la familio kaj estis devigita al alia okupo ol mi intencis, mi ankoraŭ interesiĝis diletante daŭrigi mian kolekton. Mi trovis plej diversajn rilatojn en ĉiuj mondpartoj kaj miaj konatoj sciante pri mia stranga pasio, sendadis al mi de tempo al tempo ion interesan por mia kolekto. Unu sendis specojn de tabakfolioj el Suda Ameriko, la dua venenajn folietojn el Hindujo la tria florojn el Afriko. Mi sekigis ilin kaj dum libera tempo ordigis kaj metis ilin kun latina surskribo en mian kolekton. Mia herbario senĉese pligrandiĝadis.

(Daŭrigota)

## ANONCOJ

- Kiu fraŭlino aŭ sinjorino volas veti kun s-ano Slanina, ke morgaŭ ne pluvos? Vetprezo: nur unu kiso. Vetkondiĉoj: se ŝi malgajnos, donos ŝi la kison al s-ano Slanina. Se li malgajnos, devos li doni la kison al ŝi. Sub signo: "Kiso garantiita".

- Vyměním rheuma za ischias. Zn. "Mazání došlo"

- Přijímají se další záznamy na knejpování. Zn. "Větší přiděl mokré trávy zajištěn"

- Hledám "verdan voĉon", do zpěvu! Sbornistr.

## LISTÁRNA REDAKCE:

Nechceme, abyste náš časopis Verda voĉo jen ĉtli, ale rádi bychom, abyste poslali také své příspěvky (Neotištěné příspěvky se honorují - (pozn. sazeče)

Poněvadž při psaní a rozmnožování prvního čísla našeho časopisu vznikla řada chyb a omylů, vydáváme toto číslo znovu a prosíme Vás, abyste nás omluvili a číslo dříve vydané zničili.

# Verda Voĉo de Doksy

informa, instrua kaj amuza bulteno de SKE de D o k s y

---

No 2.

31.7.1951

## DOKSY – ESPERANTISTA HEJMO

Kiam la slovakaj esperantistoj venis en la historian lokon Doksy, neniu el ili pensis pri la profundeco de impresoj, akiritaj jam dum la unua tago. Doksy, la loko de nia somera kolegio, surprizis nin ne nur per la fama esperantista verdkora amikeco, sed ankaŭ per la neesprimeblaj naturaj belecoj.

Ni, slovakaj esperantistoj, venis al Doksy kiel hejmen. Kvankam Doksy estas tre malproksime de Svit, urbo de la unua kolegio en Slovakio, ni tamen ne rimarkis la malproksimecon, tiel evidentan sur la geografia karto. Kial? Ĉar la esperantistaj koroj batas simile en la tuta mondo. Eĉ en la plej malproksima parto de nia lando ni trovas la saman senton, - la saman ĝojon, la ŝaman amon al la vivo. En Doksy, same kiel en Svit, ni estas ravitaj per la ardaĵ koroj de la gesamideanaro. Same kiel la montaj masivoj de niaj Altaj Tatroj, la lago de Mácha en Doksy vekas en niaj animoj profundan senton de io nedifinebla, neesprimebla, kio igas la homon fermi la pordon de sia koro antaŭ la malboneco de ekstera mondo kaj malfermi ĝin antaŭ ĉio, kio estas bela kaj kara.

Jes, karaj samdeanoj, la homo en Doksy evidente pliboniĝadas. Kaj - ĉar ni estas esperantistoj - nia espero pri la interkompreniĝo de ĉiuj homoj kreskas en Doksy pli kaj pli. Ni estas konvinkitaj, ke ne ekzistas diferencoj neunuigeblaj. Ni kredas, ke la popoloj de ĉiuj nacioj fratiĝos en unu granda rondo familia. Ni scias, ke la plej proksima vojo al tiu nobla celo estas nia Esperanto, por kies disvastigo ni laboras.

Kiel esprimi al vi, karaj aranĝantoj, de la kolegio, nian dankemon? Via laboro por la preparo kaj sukceso de la kolegio estas evidenta je ĉiu paŝo, farita en esperantista medio en Doksy. Niaj vortoj certe ne sufiĉas esprimi ĉion, kion la koro sentas. Ni diras tial plej simple kaj sincere: dankon por ĉio! Kaj, estu certigitaj, ke via laboro alportos sukceson en formo de novaj pliperfektigintaj kadroj de esperantistoj, kiuj trovos en Doksy la plej ĉarmajn momentojn de sia tutjara laborplena vivo.

Sema

Karolo P í ĉ : **TRIOLETO AL VI.**

Vi estas bela, sed vi hontas,  
kaj min obsedas stulta tim',  
kiam mi strate vin renkontas.

Vi estas bela, sed vi hontas,  
nur viaj oraj haroj blondas.

Ĉu mi esperu pri inklin'?  
Vi estas bela, sed vi hontas,  
kaj min obsedas stulta tim'.

**Účastníkom zo Slovenska!**

Veľmi milým prekvapením nielen pre vedenie LKED, ale i pre vedenie Slov. Esperantského združenia je nečakane veľký počet účastníkov zo Slovenska. Je dôkazom váženosti a dobrého mena LEED, kvôli ktorému mnohí priniesli aj veľké obete. Ved' už len cestovať sem z východného Slovenska nie je maličkosť. Je to však dôkazom i toho, ako nám chýba filiálka Doks na Slovensku. Začali sme ju vlani v lete pod Tatrami s veľkými nadejami a skončili sme ju s úspechom. Ved'

zúčastnilo sa vo Svite vyše 170 spokojných esperantistov. Tohto roku pre vecné i osobné ťažkosti a prekážky nemohli sme usporiadať filiálku Doks vo Svite. Všetci však túžime napraviť chybu a uskutočniť filiálku LKED na Slovensku. To je želaním tak vedenia LKED, ako i všetkých slovenských esperantistov. Preto navštevujeme svēdomite přednášky a keď sa rozídeme, rozširujeme svoje vedmosti, aby sme nezabudli, čo sme tu získali. Nezapadnime v izolovanosti, ale už teraz pomýšlejme na celok, na našu organizáciu a na jej zdokonalenie. Tu prítomných 5 členov vedenia Slov. Esp. sdruženia sdruženia sa pravidelné denne a rieši problémy nášho hnutia na Slovensku. Už teraz sa zaoberáme otázkou, kedy a kde usporiadať filiálku LKED na Slovensku, aby sme umožnili zúčastniť sa vo väčšom počte i slovenským esperantistom na možnosti zdokonalit' sa v našej reči a na spoločnej práci pri ďalšom rozvoji. Koncom LKED svoláme vás na spoločnu schôdzku a poradu v tejto veci.

(SES)

Št. U r b a n: **NOKTA EKSPRESO**  
(Daŭrigo.)

Venis la mondmilito, ĉiuj rilatoj estis interrompitaj kaj mi soliĝis kun mia kolekto, mi fremdulo en fremda lando. Komence mi ekloĝis en malgranda urbeto, kiu hazarde troviĝas sur ĉi tiu fervojo... Mi intencis sub kaŝnomo sekrete travivi la teruran mondĥaoston. Sed montriĝis, ke mi devas aĝi pli singarde, mi plurfoje estis devigita ŝanĝi la loĝejon.

"Ĉu vi estas fumanto jam delonge?" li demandis. Jesante mi respondis kaj streĉita instigis lin daŭrigi.

"Do vi certe scias, kiel fartas pasia fumanto, kiam li ekvidas, ke lia provizo da tabako komencas malaperi. Ankaŭ la mia rapide malgrandiĝis kaj mi pripensis jam rrzigni je fumado. Sed vi certe konas la aferojn... Mallongan tempon estis ankoraŭ ricevebla pipa tabako kaj mi unu tagon aĉetis la pipon" -

"Kial vi ne ricevis la tabakkuponojn?" mi demandis.

"Nu, mi ja ne estis aliĝinta ĉe la polico, kaj krome mi, kiel fremdulo, devis nepre eviti ĉiun eblon renkonti policanon."

„Jes, mi komprenas jam."

"Koncize dirite: mi devis unu tagon ataki mian herbarion. Ĉi tie troviĝis multaj specoj de tabako kaj mi sciis prepari ilin por la fumado. Decidiĝinte mi prenis laŭbezone unu tabakfolion post la alia. De tempo al tempo mi aldonis eĉ aliajn folietojn al la tabakaj kaj sukcesis krei, kompreneble post sufiĉe komplika kemia preparado, tre interesajn kaj apartajn odorojn kaj ĝuis ilin kun volupto. La afero de tiuj miksaĵoj komencis esti ege interesa kaj ankaŭ sufiĉe danĝera, ĉar, kiel mi jam diris kelkaj plantoj enhavis venenon kaj mi ne ĉiam sciis, ĉu mi post la fumado nepre ne devos viziti kuraciston..."

(daŭrigo sur la 4. paĝo)

## NOVAĴOJ.

- Dnes je úterý 31. července 1951, svátek Ignáce.
- Počasí ustálené, slunko po celý den - využijte příznivého počasí ke koupání.
- Dnešní program: Večer "Doksy v básních" - začátek přesně v 20,30 hod. v restauraci u jezera.
- Do Doks zavítá světoznámý cirkus Ctirad, jehož představení některý večer společně navštívíme. Podrobnosti budou včas sděleny.
- Noste esperantské odznaky, které si můžete zakoupiti v prodejně u Zelené hvězdy - sam. Pytloun.

## KLAĈEMA OBSERVANTO.

Societo, kiu ne volas esti nomata hieraŭ en Sparta. Ludis fame konatan ludon je "garantiaĵoj" tute laŭ la maniero de Doksy. La inicianto de tiu ludo estis nia Liduška, kiu laŭ observo de nia raportisto enkondukas en Doksy eĉ ĉijare hazardajn ludojn. Tamen ni devas konfesi, ke la gesamideanaro koncerne elpagon de garantiaĵoj (kisado) estas ankoraŭ malsperta.

Raportisto de Verda Voĉo konstatas, ke slovakaj gastoj parolas inter si dum vesperaj promenoj nur esperante. Ni gratulas al ili pro ilia entuziasmo, kiu estas ekzempla.

Ni konstatas, ke certa esperanta societo, enterigis surstrande esperantistinojn el kurso A. Ĉeinstruistoj protestas kontraŭ similaj agoj kaj atentigas, ke ili ne senkulpigos al enterigita samideanino ŝian absencon en la kurso.

Mi aŭdis, ke la loĝejdonantoj en Doksy karceras (arestas) niajn kurspartoprenantojn. Tiu ilia ago malebligis al nia fervora knejpisto knejpadon.

Dnes redakce zjistila, že chodci, jdoucí z Údolní ulice kolem parku k letnímu kinu povážlivě kroutí hlavami a s překvapením hledí na zarosenou louku. Náš pohotový reportér zjistil příčiny udivu chodců. Po zarosené louce pochodovalo 6 postav (dvě ženy a čtyři muži), mluvící jim neznámou řečí. Vyšlo najevo, že oni trávošlapové nejsou utečenci z Kosmonos, ale přívrženci knejpvání.

## SENTENCOJ.

Netápej bez cíle, nýbrž uplatňuj při každém snažení spravedlnost a při každém myšlení usiluj o bezpečný soud. - Hleď k jádru všeho! Na žádné věci ať ti neujde její pravá jakost a pravá cena! - Lidé jsou přírodou stvořeni kvůli sobě navzájem: buď je tedy poučuj nebo snášej!

(M. Aurelius: Hovory k sobě samému)

## PROVERBOJ.

Sonorado al li venas, sed de kie li ne komprenas. - Kia greno, tia pano. - Mi hejme sidis, nenion vidis. - Mano dekstra ne sciu, kion faras la maldekstra. - Saĝa scias, kion li diras – malsaĝa diras, kion li scias. - Ne ŝovu la nazon en fremdan vazon! - La tuta ludo ne valoras kandelon! - Forte sidas, kiu Dion fidas. - Kie timo, tie honto! - Kolero pravecon ne donas. - Vi amas preni, amu redoni.

"Unu vesperon, kiam mi, kiel kutime plenigis la pipon per la plej diversaj folietoj, okazis io terura. Post kelkaj enspiroj de fumo tuŝis min stranga eksento; nedifinebla incito enigis mian menson kaj ekregis min, senĉese kreskante. Mi tuj, memorinte danĝeron de venenaj folietoj, estingis la pipon kaj formetis ĝin. Sed ve.. . ! , jam tro malfrue. Mi sentis min meze de la senfina oceano de fajro, baraktanta kiel ŝipeto sen gvidilo sur la tempesta maro, ĵetiĝanta per ondegoj. Fajraj flamoj atakis min de ĉiuj flankoj, kaj tute ne havante povon eĉ de plej malgranda movo, mi falegadis en senfundan fajran abismon. . . Poste la flamoj malaperis kaj. jen mi sentis min observata de miloj da okuloj, jen mi troviĝis sola en la tuta universo. Levita per nevidebla forto mi ekstaris subite vid-al-vide antaŭ la Granda Nekonato...

Mi eksentis la pezon de jarmiloj.. . Kelkfoje mi ekkaptis la momenton, kiam mia pensado preskaŭ atingis la normalan staton kaj kun la tuta volo mi penis koncentrigi la menson, sed vane... Denove mi ekvidis simbolon de la Eterneco, denove kaptis min la Granda Turniĝo..., kaj mi ekaŭdis bruegon de Granda Silento. Tempo-spaco malfermis siajn pordegojn antaŭ mi kaj mi enpenetriĝinte, malaperis por ĉiam..."

